

Esperanto kaj Interlingua, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 711, 1977.05.25 & 27 & 28

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Pasintan semajnon ni komencis raporti al vi pri la temo Esperanto kaj Interlingua laŭ verko de Edo Bernasconi, kiu ĵus aperis en franclingva traduko en la kolekto 'Studoj' de Kultura Centro Esperantista, sub la titolo 'Espéranto et Interlingua. Brève étude comparative'. Kiel ni diris, temas pri resumo de tre detala studo, kiu baldaŭ aperos en la sama kolekto Studoj sub la titolo 'Faktoj kaj teorioj kontraŭ mitoj kaj antaŭjuĝoj: Esperanto aŭ Interlingua?' Ni daŭrigas tiun prezenton.

A.- Hodiaŭ ĉiuj lingvistoj akceptas la ideon, ke lingvon oni povas planadi. La renaskiĝon de la antikva hebrea lingvo oni ekzemple planis.

Cl.- Lingvo, kiu vivas, estas lingvo, kiun kunportas grupo da homoj. Ĝi estas ĝia interna komunikilo. La informreto, almenaŭ grandparte, interne de tiu komunaĵo, dissendas informojn en tiu lingvo. Nenio estas dirita, en tiu difino, pri komuna historia deveno - ekzemple la uzo de la angla far de usonaj ŝtatanoj nenion indikas pri tradicioj familiaj aŭ, rekte, pri origino - pri komuna vivo sur difinita teritorio (ekzemple la jida estas lingvo, kiu estas parolata diaspole), pri familia aŭ konscia utiligo de la koncerna lingvo, tio estas pri la fakto, ĉu la koncerna lingvo estas familia aŭ ne - ekzemple la pisina en Njugini, Novgineo, estas la oficiala ŝtatlingvo - sed ĝi estas nenies familia lingvo.

A.- Planlingvo kiel Esperanto estas karakterizata de la jenaj sociolingvistikaj faktoroj:

Cl.- Ĝi estas uzata en interŝanĝoj kulturaj (en plej vasta senco de la vorto) inter diverslingvaj homoj;

A.- Ĝi estas dua lingvo, tio estas : ĝi ne estas origine familia. Esperanton do oni parolas tra kaj per persona decido, elekto, kaj ĝi estas lernata ĝenerale ekster la primara socialigo - tio estas, ekster la familia socialigo de la infano - sed dum la periodo de la sekundara socialigo - do en lernejo, grupoj.

Cl.- Esperanto estas lingvo parolata ne en teritorio, sed en diaporaj grupoj, en sociologia senco de la vorto.

A.- Tiuj konsideroj reprezentas la bazon de socio-lingvistika esploro pri la vivo de planlingvo.

Cl.- Esperanto ne estas propono de perfekta lingvo. Pro du kaŭzoj: unue, oni ne povis ĝis nun klarigi senekvivoke, kio estas perfekta lingvo. Due, kvankam ekzistas diversaj provoj tion difini, ni rimarkas, ke ekzistas gravaj kontraŭdiroj inter defendantoj de logika perfekteco, de semantika perfekteco, de psikologia perfekteco, kaj tiel plu.

A.- Esperanto estas tute simple la provo prezenti al la mondo lingvon relative simplan, sed ne primitivan, flekseblan, relative facile utiligeblan kaj permesantan taŭgan penso-esprimon. Tiuj estas la celoj de Esperanto. Planita lingvo, konstruita por certa celo, devas esti juĝata laŭ tio, ĉu ĝi sukcesis atingi la menciitan celon aŭ ne. Ĉiu alia kriterio estas aŭ superflua, aŭ rekte erara. Ekzemple simileco al la novlatinaj lingvoj, senpera legebleco, komputoro-utiligebleco senpera, kaj tiel plu.

Cl.- Esperanto naskiĝis kiel lingvo-provo: ĝi estis origine skizo, lingvo-skemo sen socia historio. Sed ĝi sukcesis . Ĝi en-uziĝis. Esperanto iĝis lingvo de diaspor-aspekta kolektivo, kiu ĝin selektis por interna mesaĝ-interŝanĝo en interlingva nivelo. Kaj tio daŭris: nun, post 80-jara provo, ni rajtas diri, bone dokumentite, ke Esperanto - kiel cetere jam antaŭvidis en 1916 Ferdinand de Saussure - eniris la historion. En la etniaj lingvoj la rilato inter lingvo lingvo-strukturo, lingvoskemo kaj lingvaĵo, konkretiĝo de tiu strukturo en la socia praktiko de la unuopuloj) estis reciproka, dialektika. Kaj la skriblingvo estis sekundara al la uzo parola.

A.- En Esperanto la situacio ne povis esti la sama: komenciĝinte kiel strukturo, ĝia unua konkretiĝo estis sub formo de skriba lingvaĵo. Poste, dank'al la plioftiĝo de la interŝtataj kaj interpersonaj rilatoj, estiĝis ankaŭ la parola lingvaĵo. Kaj tiam, iom post iom, formiĝis la reciproka rilato inter lingvaĵo kaj lingvo: la lingvo unue fiksas la limojn de la lingvaĵoj, kaj la lingvaĵoj influas la leĝojn de la sistemo. Kaj Esperanto tiel iĝis plenrajta idiomo.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos la prezentadon de la kompara studo 'Esperanto aŭ Interlingua' de Edo Bernasconi. Prelegis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*